# 9/11: Ĉu nuklea disfandiĝo?




**Hodiaŭ nur malmultaj homoj kredas je la oficiala versio de la eventoj de la 11a de septembro. Multaj sciencistoj kredinde refutis la oficialan version, sed ne donis decidan klarigon pri ĉiuj fenomenoj observitaj. Per sia nova libro « La Modelo Grundo-nulo », la germana fizikisto Heinz Pommer verŝajne sukcesis fari ĝuste tion. En ĝi li plulaboras laŭ la klariga aliro de la eksa sovetia militisto Dmitrij Khalezov kaj nun emfaze avertas kontraŭ la senskrupulaj kreintoj kaj ilia teknologio.**

Jam ekde la 11a de septembro okazis diskutado, esplorado kaj spekulacio pri tio, kio efektive okazis en tiu fatala tago. Bush kaj Blair kulpigis 19 islamanojn, kiuj flugigis aviadilojn kontraŭ la Ĝemelajn Turojn kaj la Pentagonon, ĉiuj direktitaj de alia islamano el kaverno en Afganujo.

Malmultaj homoj hodiaŭ, se ili pripensis, ankoraŭ kredas la oficialan version de la eventoj. Lastatempa studo de la Universitato de Fairbanks en Alasko montris, ke la tria turo, kiu ne estis trafita de aviadilo, ne povis esti faligita per fajro sole, kiel oni oficiale asertis.

La unua scienca artikolo pri la detruo de la Ĝemelaj Turoj estis ‘Sed kial tute kolapsis la WTC-Konstruaĵoj?’ de Pr Steven Jones. Lia universitato suspendis lin kun pago kaj poste maldungis lin. Li montras multajn trajtojn de ĉi tiuj kolapsoj, kiuj ne povas esti klarigitaj per la oficiala teorio, kaj montras, ke estas pli verŝajne, ke la konstruaĵoj detruiĝis en kontrolitaj malkonstruoj. Li pruvis la ekziston de la incendia termito, kiu povus esti uzata por tranĉi ŝtalon.

Tamen, la artikolo preterlasis esencan pruvaĵon de la supra sekcio de la Suda Turo klinanta laŭ 15-grada angulo. La angula inercio de tio signifus, ke ĝi ĵetiĝus sur la teron al la flanko de la turo, krom se ĝi estus diseksplodigita per iu neklarigita mekanismo. Simpla kontrolita malkonstruo ne povus klarigi la kolapson.

En 2009 aperis artikolo en kemia revuo prezentanta atestaĵon, ke la polvo de la konstruaĵoj enhavas la eksplodan nanotermiton. La sugesto estis, ke ĝi estus pentrita sur la muroj de la turoj, sed ekzistas neniu analizo de la efiko de pentrado de nano-termita ĝelo sur murojn. Ĉu ambaŭ flankoj de la muroj devus esti pentritaj kaj poste ekbruligitaj samtempe por polvigi la murojn? Kiel tio estus farita?

Tamen, la artikolo rigardis nur tiujn turojn, kaj preterlasis esencajn pruvaĵojn pri la cetero de la Grundo-nula loko. Aliaj konstruaĵoj estis damaĝitaj, kaj estis pruvaĵoj pri radia damaĝo de "rostitaj aŭtoj" kaj homoj kaptitaj en la turoj senvestigante sin, konata rezulto de « Active Denial System » (direktitaj energiaj armiloj kiel uzataj en Usono en tumultkontrolo. Ĉi tiuj uzas mikroondojn de ĉirkaŭ 100 GHz.)

Intertempe, Pr Judy Wood kunigis fotografajn atestojn pri la damaĝoj en la tuta zono, kaj en 2009 ŝi publikigis libron, 'Kien iris la turoj? Pruvaĵo de Direktita Liberenergia Teknologio je 9/11 '. La unuaj pluraj ĉapitroj prezentis fotojn kaj aliajn datumojn kiuj ŝajne kontraŭas la

ideon de regata malkonstruo per eksplodaĵoj. Ŝi poste proponis teorion de nekonata 'direktata energio' de la ĉielo, kiu polvigis (termino de Judy Wood por speciala speco de polvo) la turojn. Surbaze de sia esplorado ŝi konkludis, ke ne temas pri altaj temperaturoj, kaj proponis, ke la 'Efekto Hutchison', ne konata de fiziko, estis uzata por la 9/11.

En sia libro ŝi malakceptis nano-termiton atribuante la spurojn trovitajn al alia origino, kaj ŝi malakceptis nuklean reagon, dirante, ke ne ekzistas pruvaĵoj de radioaktiva postlasaĵo. Tamen ne estis analizo kaj neniu konsidero pri specoj de nukleaj aparatoj: ĉu fisio aŭ fuzio, ĉu supertera aŭ subtera, ĉu taktika nuklea armilo aŭ nuklea disfandiĝo.

.Intertempe, eksa sovetia civitano, eks-membro de sekreta milita unuo respondeca pri detektado de nukleaj eksplodoj, Dmitri Khalezov, celis la ideon, ke la turoj de la WTC povus esti detruitaj per subteraj nukleaj eksplodoj. Cetere li atestas, ke, kiel militisto en la Sovetia Speciala Kontrola Servo, li sciis pri enkonstruita “urĝa nuklea malkonstrua plano” de la Ĝemelaj Turoj jam antaŭ la 80aj jaroj. En 2010 li publikigis libron, nun en sia kvara eldono, en la rusa kaj diversaj aliaj lingvoj, proponante sian teorion pri subteraj nukleaj eksplodoj. Tiutempe lia teorio ŝajnis neverŝajna, kaj estis malakceptita de pli konataj enketistoj

Tiun esploran linion sekvis la germana fizikisto Heinz Pommer. Lia universitata specialiĝo estis en nuklea fiziko. Li studis subterajn nukleajn provojn, kaj venis al la konkludo, ke tia nuklea aparato ja povus klarigi plej multajn neklarigitajn fenomenojn de 9/11, kvankam estis unu aŭ du problemoj. Li poste modifis la teorion, proponante ne ĝuste nuklean eksplodon, sed nuklean disfandiĝon. Ĉi tio ŝajne eĉ pli bone klarigus la mankon de radiada spuro en la aero post 9/11.

Nuklea disfandiĝo estis esplorita jam en la 1960-aj jaroj por "nuklea modifo de la pejzaĝo". Sovetunio tiam uzis ĝin por krei grandegajn rezervujojn. Pliaj evoluoj en la Okcidento ebligus tranĉi profundajn kanalojn tra montoj por aŭtovojoj aŭ fervojaj ligoj. Unu aspekto, pri kiu esploristoj laboris, estis la redukto de radioaktiva postlasaĵo post tia eksplodo, kaj tio povus klarigi la malaltnivelajn spurojn de postaj radioaktivaj materialoj sekve de 9/11. Ĉar politikistoj maltrankviliĝis pri la publika akcepto, la esplorado estis relative diskreta. Kompreneble ĝi estus konata en la nuklea industrio kaj la universitata komunumo.

Heinz Pommer prezentis siajn teknikajn datumojn en sia retejo, kaj li donis publikajn paroladojn dum la procedo. Nun li publikigis terskuan libron en la angla, kun kontribuoj de pluraj aliaj fizikistoj, sub la titolo: « La Modelo Grundo-nulo »

“Laŭ la ĝusta skalo ĉio fariĝas simpla”. Ĉi tiu estas la centra ideo de Heinz Pommer, kiun li reklamas en sia libro. « Laŭ la ĝusta skalo ni povas vidi la gravajn rilatojn, kiuj iras ĝis nuklea ĉantaĝo kontraŭ civila socio", li skribas. En la libro li enkondukas la disvolviĝon de nuklea modifo de la pejzaĝo, kaj montras kiel tio kongruus kun la spuroj de radioaktiveco lasitaj ĉe Grundo-nulo. Li ankaŭ montras, kiel nuklea radiado respondecus pri enmiksiĝo en iuj filmetoj tiam faritaj, kaj kial papero plurestis, sed fero ne. Li iom detaligas pri la modelo mem, kun malrapide-brulaj subteraj nukleaj reagoj, kondukantaj al alt-temperaturaj ventoj, kiuj elverŝas la lifto-ŝaktojn, kaj diserigas multajn konstruajn materialojn. Li ankaŭ skribas pri la "senspinaj universitatoj", kiuj fermis la okulojn al la pruvaĵoj.

Se Dmitri Khalezov kaj Heinz Pommer pravas en siaj konkludoj, ke la turoj de 9/11 estis

faligitaj per nukleaj aparatoj, tiukaze la implicoj estas hororaj: la komenco de nova epoko de nuklea terorismo por kapti la tutmondan potencoṇ.La libro de Heinz Pommer « La Modelo Grundo-nulo » devas esti vidata kiel averto al la mondo. La signifo de tiu grundo grave superas iun ajn teroristan atakon.

**de ian./sl.**

---

**Fontoj:**


"Sed kial tute kolapsis la WTC ?"
, Steven Jones, Journal of 9/11 Studies, September 2006
( http://www.journalof911studies.com/why-indeed-did-the-world-trade-center-buildings-completely-collapse/)

Aktiva Termitika Materialo Malkovrita en Polvo de la Katastrofo de la Monda Komerccentro 9/11
Niels H. Harrit, Jeffrey Farrer, Steven E. Jones, Kevin R. Ryan, Frank M. Legge, Daniel Farnsworth, Gregg Roberts, James R. Gourley, Bradley R. Larsen, The Open Chemical Physics Journal, 2009, 2, 7-31
( https://wikispooks.com/w/images/c/cc/Nano-Thermite.pdf)

"Kien Iris la Turoj? Atestoj pri Direktita Libera Energia Teknologio en 9/11"
Judy Wood, The New Investigation, 1 Dec. 2010( https://www.checktheevidence.com/wordpress/product/where-did-the-towers-go-by-dr-judy-wood/)

"La tria vero pri 9/11"
Dmitri Khalezov, self-published as PDF, Full edition( version 4), 4 July 2013( http://www.911thology.com/)

La Modelo Grundo-nulo
Heinz Pommer, François Roby, David Madlener( https://www.barnesandnoble.com/w/the-ground-zero-model-heinz-pommer/1137150656?ean=9781663537676)

La Modelo Grundo-nulo - Fizika modelo por 9/11
Heinz Pommer, prezento ĉe la 17a Kontraŭcenzura Konferenco (AZK), 23.11.2019, en germana lingvo( www.kla.tv/15477) dublada en la angla( https://www.kla.tv/15470), la rusa( https://www.kla.tv/15639) la latva( https://www.kla.tv/15757) kaj la franca( www.kla.tv/15477)


---

**Ankaŭ tio povus interesi vin:**

#911-eo - 11 Septembro - www.kla.tv/911-eo

#HeinzPommer-eo - www.kla.tv/HeinzPommer-eo

**Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...**

- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie:** **www.kla.tv/abo-en**

**Sekureca Avizo:**

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie:** **www.kla.tv/vernetzung&lang=eo**

*Licenco:* *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.